

S o l e n a j a r o

Antaŭ nelonge en unu esperantista revuo mi legis, ke ĝis nun ĉirkaŭ cent urboj en diversaj kontinentoj de la mondo donis al unu de siaj stratoj, placoj aŭ parkoj la nomon Zamenhof aŭ Esperanto. Troviĝas inter ili ekzemple Vieno, Geteborgo, Rio de Janeiro, Sao Paolo, Sofio kaj aliaj. Cent jaro post naskiĝo de la varsovia kuracisto trovas do la nomon Zamenhof enskribitan en la publikan memoron de la mondo kune kun la aliaj nomoj de internacia signifo.

Ĝi apartenas al la kategorio de nomoj kiel Leonardo da Vinci, Koperník, Newton, Leibniz, Popov, Goethe, Edison, nomoj, kiuj signifas la tuthomaran kulturon kaj sciencon. Oficialan ateston pri ĉi tio donas la ampleksa listo da eminentuloj el la tuta mondo, kies nomoj ornamas la Internacian Patronan Komitaton por festoj de Zamenhof-jaro. Leginte tiun ĉi liston oni ne povas subpremi impreson, ke okazis io vere unika, nekutima.

La listo konsistas el nomoj signifantaj la plej diversajn opiniojn, rasojn, religiojn, partiojn, kaj en tiu karaktero similas sole al ununura alia listo, nome al la listo de Ŝtatoj-Membroj de UNO. Konsiderante ĉi fakton, oni bone komprenos la artikolon de la Monteidea rezolucio de UKESCO, kie estis deklarita, ke "rezultoj atingitaj per Esperanto respondas al la celoj kaj idealoj de UNESCO." Tamen oni ne povas diri, ke la grandega batalo por oficiala rekono de Internacia Lingvo jam atingis sian pinton kaj ke en proksima tempo efektiviĝos la malnova sonĝo de esperantistoj, universala enkonduko de la lingvo en publikajn lernejojn. Ne, datrevenoj, eĉ gravaj kaj solenaj, ne anstataŭos ĉiutagan, seriozan, insistan laboradon, kiu restas la sola vojo al fina venko de nia afero.

Ekstera la datreveno sendube utilos por akceli la publikan intereso pri afero hodiaŭ por amaso da homoj ankoraŭ nenion signifanta. Interne ĝi devas plenumi tute specialan taskon krom tio, kion mallonge esprimas la sloganoj de UEA. Se devas turni atentemon de aktivaj esperantistoj al la personeco de D-ro Zamenhof por ekkompreni la fundamenton kaj la fonton, el kiu naskiĝis lia nobla ideo, kaj per kiu efektiviĝis lia mirinda verko. La fonto de ideo estis ĉe Zamenhof pura, sindona a m o. Amo ne kiel psikologia ajo, sed kiel principo de la vivo. Li mem plurfoje klare konfesis tiun ĉi admirindan econ, kiu lin ĉiam movigis al senlaca laboro. Kiu foje oferis iom da tempo por tralegi la historion de Internacia Lingvo, trafos la demandon, kial ĝuste Esperanto, tiu fundamenta, originala, Zamenhofa Esperanto, venkis la longan batalon de multnombraj projektoj kaj reformoj de internacia lingvo, poreterne restintaj nur sur papero? La respondo kuŝas ne nur en la nombro kaj kvalito de lingvaj avantaĝoj, ĝi kuŝas en la personeco de la aŭtoro mem. Ĉu oni ne taksas la literaturan aŭ politikan verkon ankaŭ laŭ la verkisto? Ĉu oni ne pritraktas privatan kaj moralan vivon de famaj homoj, de geniuloj de la homaro? Certe, ĉar ĉiu verko estas ankai morala fakto, nedisigebla de ĝia aŭtoro. Esperanto havis feliĉon, ke ĝia kreinto estis geniulo ne nur el la lingva, sed ankaŭ el la morala vidpunkto, homo de senmakula karaktero, kiu en la movadon enspiris noblecon de lia koro. Tiu ĉi nobleco ĉiam vivis inter la esperantistaro, ĝi konservis puron de la lingvo dum reformfrenezado, ĝi savis ĝin de malapero dum jaroj de nacista persekuto, ĝi en ĉiu epoko de nia rapidema evoluo altiris homojn serĉantajn idealon de sindono kaj amo. /Ĵus mi

/Daŭrigo sur la 6-a paĝo/

N-ro 53

Januaro - Aprilo 1959

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA kunvenadas ĉiumerkrede en Praha 2. Ve Smečkách 26 je la 20-a horo.

7.1. J.Šustr: Alberto Bobowski, samtempulo de J.A.Komenský

14.1. A.Bárochová: La 17-a U.K. en Ĝenovo 1925.

21.1. J.Marik: Evoluo de Esperanto en la landoj de popoldemokratio.

4.2. Novotný: Junulara konferenco en Brno. Seemanová: Unu gut' da mielo

11.2. Diversaj sciigoj

18.2. Vivanta ĵurnalo

25.2. Forman: La februara venko de laboristo j en ĈSR.

4,3.. Viva gazeto. Seemanová-Staněk: Greka patrioto Manolis Glezos.

NIAJ MEMBROJ KAJ AMIKOJ.

MORTIS. Prof .Richard BLUMAUER el Praha-Košíře mortis en jaro 1958. Li estis nia membro ekde 1945; la lasta Bulteno returnita kun rimarko "mortis".

Georges DELANOUE, estinta ĉefdelegito en Parizo, amiko de nia klubo forpasis la 31-an de marto 1958 post longa malsano en Tanger, Maroko. La malĝojan sciigon donis al ni per malgranda vizitkarto lia filino, F-ino Germaine Delanoue. Ni kondolas kaj memoras.

GEEDZIĜIS. Jiřina Holoubková kaj Zdeněk RYCHNA trovis la komunan vojon la 14-an de februaro 1959. Ni esperu, ke ankaŭ la familio baldaŭ verdiĝos.

H.K.BOUŠKA 75jara. La 2-an de marto atingis 75 jarojn unu el la plej malnovaj kaj plej laboremaj pioniroj de esperanto inter la Ĉeĥoj, Hynek Karel BOUŠKA. Esperantisto de 1901, kunfondinto de E-Klubo en Praha, kunlaboranto de La Progreso, redaktoro de Bohema Esperantisto, de Ĉeĥoslovaka Gazeto, aŭtoro de bonega lernolibro "Lernejo de Esperanto". Li ĉefe tradukis la Lingvajn Respondojn de Zamenhof, eldonis broŝuron "Slovakoj kaj Magiaroj".

Dum jardekoj, precipe en la unuaj jaroj de E-o, li verkis centojn da propagandaj artikoloj en dekoj da ĉefurbaj kaj provincaj gazetoj. Lia propaganda flugfolio: "Esperanto - jazykové pojítko národů" /E - lingva ligilo inter la nacioj/ aperis en dekmiloj da ekzempleroj. Persone modesta, iom homevitema, li estis dum sia aktiveco E-lingva aŭtoritato por ni. Ni sincere salutas lin dezirante al li ĉion bonan.

MORTIS HEROO KAJ AŬTORO de unu el la plej interesaj libroj kiuj estis tradukitaj en Esperanton el ĉeĥa lingvo. JAN WELZL, kiu en verko "Tridek jarojn en la ora nordo" tre bele priskribis sian vivon en arkta regiono kaj sur Nov-Siberia Insularo, mortis en ormineja urbo Dawson apud la limo Kanado-Alasko jam en la jaro 1951, sed nur nun ni sciigis pri lia forpaso. Li mortis 83 jaraĝa, post kiam li pasigis pliajn 20 jarojn en "Ora Nordo". Lia verko, kiu antaŭ 20 jaroj aperis krom en la ĉeĥa kaj esperanta ankaŭ en aliaj lingvoj kaŭzis kelkloke en la mondo polemikojn pri aŭtentikeco de priskribitaj travivaĵoj. Kelkaj fakuloj eĉ deklaris la libron genia fantaziaĵo, ĉar ili kredis, ke la lokoj en kiuj Welzl jardekojn vivis estas senhomaj regionoj, en kiuj neniu ajn vivis aŭ vivas. Hazarde, ne longe post interŝanĝo de tiuj opinioj revenis el Novsiberia Insularo soveta ekspedicio de antropologo Pinegin, kiu serĉante tie restaĵojn kaj postsignojn pri fosiliaj bestoj, trovis tie ne nur ilin, sed ankaŭ vivantajn homojn, eskimojn kaj blankajn polusanojn, kiuj loĝis en grotoj, ĉasis bestojn, havis sian estron, kaj vivis tie forlasitaj de tuta mondo. WELZL do estis plene rehonorigita. En multaj bibliotekoj esperantaj troviĝas liaj TRIDEK JAROJ EN LA ORA NORDO. Enhavo de tiu libro eatas vera ornamo de tiuj librostokoj. Ni petas niajn legantojn proponi al ni tiun libron, kiun ni volonte aĉetos por biblioteko nia. La proponojn aŭ sendaĵojn direktu al J.Šustr, Dlouhá lo, Praha I.

- 3 -

ÚSTI NAD LABEM: Decembra vespereto honore al L.L.Zamenhof bone sukcesis. Ĉirkaŭ 40 ĉeestintoj el Ústí, Teplice, Krupka, Most, Děčín, Běhánky. En la dua programparto bonegan sukceson rikoltis filmo pri la Someraj Esperanto-Tendaroj en ĈSR, turnita de J.Solnický. E-maskobalo kaj laborkunveno de JUNULARO en BRNO. 31.1. okazis en Brno tradicia maskobalo, kiun partoprenis ankaŭ multaj gastoj el aliaj lokoj. 1.2. antaŭtagmeze kaj posttagmeze okazis laborkunvenoj de Junularo el klubo en Brno. Partoprenis tie pli ol 50 gesamideanoj el Brno kaj aliaj lokoj en ĈSR. Oni pridiskutis diversajn demandojn, nome situacion en ĈES, ĉeesteblecon dum nunjara Universala Kongreso en Varsovio, eldonadon de informcirkulero por Junularo, ktp. La ĉefa temo estis Someraj Esperanto-Tendaroj. Dum vigla diskutado estis finfine decidite, ke ĉijare oni aranĝos nur du tendarojn: 7- ĝis 14-tagan en proksimeco de Třebíč aŭ akvobaro Vranov kun kursoj A,B,C, kaj du 14-tagajn etapojn proksime de la banloko Bechyně apud rivero Lužnice /Sudbohemia/ kun kursoj B,C,D. En la nomo de EKP la kunvenon ĉeestis s-ano Vladimír Novotný. /Laŭ nia_ lasta sciigo oni nun kalkulas sole kun unu ĉijara SET, nome apud Třebíč, ĉar mankas spertaj gvidantoj kaj SET devas esti serioze aranĝataj -red/

DIVERSAJ INFORMOJ.

LA BIBLIOTEKO de ESPERANTISTA KLUBO en PRAHA ricevis apartan ejon, en kiu ni instalos ĝin kaj tiamaniere ebligos al nia membraro pli bone kaj pli multe uzadi tiun grandan literaturan trezoron, kiu hodiaŭ nombras preskaŭ 4000 malsamajn volumojn! Nacia komitato per sia dekreto esprimis jam sian konsenton ludoní al ni ejon en proksimeco de Malnovurba Placo. Ĉar la ejon ni devos antaŭe konforme por nia celo adapti, aranĝi k mebligi, ni bezonos ĉiuf flankan helpon de ŝatata nia membraro!

Kluba kaso apenaŭ sufiĉos por pagi kostojn de ĉiuj adaptaj laboroj /elektro, akvo, gaso, forno, riparo de planko, pentrado, mebloj, ktp./ tial NI KREAS FONDAĴON "BIBLIOTEKO" „, kie ni kolektos mondonacetojn el kiuj ni pagos kostojn de tiuj laboroj kaj aĉetoj. Pri la uzo de kolektita mono ni aperigos raporton en BULTENO. Se iu volus donaci al ni ŝrankon, seĝojn, tablon, ktp., proponu tion al ni antaŭe. - Al tiu ĉi numero ni almetas postan transpagilon, helpe de kiu bonvolu sendi al ni vian eventualan kontribuon por la fondaĵo BIBLIOTEKO.

LERNOLIBRO DE ESPERANTO, kiel helpilo por la instruado aperos en proksima tempo zorge de Esperantista Klubo ĉe Urba domo de kulturo en Jihlava. En nia kunlaboro kun tiu ĉi tre vigla klubo ni certigis por ni grandaj kvanton de tiu lernolibro, ĉar temas pri lernolibro tre bona, verkita de ŝatata nia membro profesoro Theodor KILIÁN. En nuna momento ni ne konas ankoraŭ la prezon. Ĝi moviĝos inter 10-15 Kčs. Jam nun ni kolektas antaŭmendojn! Post la apero de la libro ni sendos al ĉiu mendinto nian transpagilon kun notita sumo kaj nombro da ekzempleroj kiujn li mendis. La ekspedo okazos tuj post la rivevo de mono. ESPERANTISTA KLUBO en PRAHA, Dlouhá tř.10, PRAHA I. La lernolibro estos havebla ankaŭ ĉe la eldonisto, Klub Esperantistů při Městském Domě Osvěty v Jihlavě, Žižkova 12.

PARALELAN ELDONON de la menciita lernolibro efektivigis dume esperantistoj en TŘEBÍČ - la libreto estas 68-paĝa, fotorotaprintita, broŝurita, enhavas la 20 lecionojn kaj vortareton /E-ĉeĥan kaj Ĉeĥan-E-an/ sen Internacia Legolibro. Prezo estas Kčs 10,- sen posto.

EKP ricevis dankleteron de ANDERSEN a MUZEO en Odense /Danio/ por la sendita "belege ekipita kaj ilustrita libro H. C. Andersen, Fabeloj." Dum 50 jaroj jam liveradas nia klubo ĉiun ĉeĥan eldonaĵon de Andersen al tiu ĉi muzeo.

UNUA EKSPozICIO DE INSTRUISTOJ PORBELARTA EDUKO, aranĝita de Urba Komitato de sindikatoj en januaro en Malnova Urbodomo, enhavis ankaŭ esperantan grafikon de nia ŝatata membro s-ano Adolf BARTOŠÍK. Ni ĝojis kaj gratulas!

RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ DUM LA VII-a MONDA JUNULARA FESTIVALO. La 28-an de julio 1959, en la kadro de la VII-a Festivalo okazos en Vieno /Aŭstrio/ internacia renkontiĝo de junaj esperantistoj. La programo de la Festivalo /26.7.-4.8./ estas tre riĉenhava kiel ankaŭ tiu de la esperantista renkontiĝo. Tamen dependas de la esperantistoj mem, ke ili faru ankoraŭ pli riĉan kaj interesan programon. Sendu al la Preparkomitato viajn proponojn kaj sugestojn. Oni ankaŭ ĝoje salutos tiujn esperantistojn, kiuj traveturante al

- 4 -

la Universala Kongreso de Esperanto haltos en Vieno. Anoncu vian partoprenon al: Preparkomitato de la VII-a Festivalo, "Esperanto", Wien I, Seilerstrasse 15, Aŭstrio.

Aŭstrio. /El raporto, ricevita de la Festivalkomitato/

TURISMAJ INFORMOJ EL POLLANDO estas ilustrita, lukse eldonita broŝuro, informanta pri la turismo kaj vidindaĵoj en Pollando, kun artikolo pri la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio /en ĝi troviĝas informo, ke nia "Verda Ĉaro" verŝajne prezentos teatraĵon al la kongreso/. - Ricevebla senpage. Skribu al: Pola vojaĝoficejo "Orbis", Warszawa, Bracka 16, aŭ al: Pola Esperanto-Asocio, Warszawa, Nowy Swiat 27.

REDAKCIO DE "MLADÝ SVĚT" /Juna Mondo/, nova semajna gazeto /ilustrita/ eldonata de Centra Komitato de ĈSM /Ĉeĥoslovaka Junularo-Ligo/ post traktado kun nia redaktoro konsentis je regula kunlaborado kun ni. Jam en venontaj numeroj de tiu ĉi progresema gazeto ni do esperas trovi artikolojn pri nia lingvo kaj movado, precipe junulara. Temas pri unua paŝo en daŭran kunlaboradon kun la publika preso; afero, en kiu oni jam kelkfoje malsukcesis, domaĝe al la tuta esperantistaro en nia lando. Tial ni petas nian vastan amikaron, aĉetu la gazeton MLADÝ SVĚT, reagu je ĉiu mencio pri nia movado, skribu amase al la redakcio, ke oni vidu, ke ni ekzistas! Nia celo tiuflanke estas regula Esperanto-rubriko. Tamen nia sukceso dependas je aktiva subteno de ĉiu nia amiko, kiu komprenos ke nur trapasante la limojn de niaj internaj cirkuleroj kaj bultenoj ni povos ree vekti la publikan intereson pri la lingvo. Ĉiujn informojn koncernantajn junajn esperantistojn bonvolu tuj sendi al la E-kunlaboranto de la menciita gazeto, redaktora de BULTENO. Koran antaŭdankon!

NIA ESPERANTUJO.

Per ĉi tiu nova rubriko ni intencas plenumi deziron de multaj niaj legantoj kaj daŭrigi almenaŭ parte la iaman informadon pri laboro de E-rondetoj en diversaj „regionoj de nia respubliko. La movado nun kreskas vere mirinde. Preskaŭ ĉiusemajne, ni ekscios pri iu nova grupo en malproksima urbo, kie ĝis nun neniu serĉus eĉ unu verdulon. Ekzemple: en KRÁLÍKY POD SNĚŽNÍKEM ekzistas laŭ hazarda

informo el neesperantista fonto tre vigla grupo, kiu aranĝas kunvenojn kaj bonege propagandas per afiŝkestetoj. Oni laŭdire havas impreson, ke preskaŭ ĉiun kulturan vivon de la urbeto iniciatas esperantis-fco j. Jen, Kralikanoj, skribu al nia redakcio pri via agado! Kaj la aliaj, ĝis nun silentaj, el JIČÍN, TÁBOR /nur hazarde ni mencias/ Skribu! La venonta BULTENO, kiu aperos dum majo, enhavu jam amason da freŝaj informoj pri la vivo de nia Esperantujo. Ĉar: via agado - nia ĝojo.
EL LA REVUOJ.

LA PROGRESANTO /Amsterdam/ modesta, sed vere tre valora revuo por ĉiuj,,kiuj volas pliperfektigi en la lingvo. En sia rubriko "Facile legi Esp-on" ĝi alportas daŭrigojn de fabelo "Salo pli valoras ol oro" de Božena Němcová, en la traduko de membrino de Esperantista Klubo en Praha, s-ino Anna HEJNOVÁ. Oktobra numero informas pri la mortintoj en jaroj 1956 - 58, citante nomojn de niaj ne forgesindaj longjaraj membroj kaj pioniroj D-ro Stanislav KAMARYT kaj Theodor ČEJKA. Ni ĝojas, ke la tria el la tie cititaj ĉeĥaj pioniroj kaj membroj de EKP, s-ano Eduard KUHNL tamen ne mortis, kiel ni en lasta tempo konstatis, kaj sincere deziras al kunfondinto de nia Klubo ankoraŭ longajn jarojn de feliĉa kaj kontenta vivo. /Pri la revueto LA PROGRESANTO ni verŝajne dum proksima tempo ne aperados, ĉar ĝi dume ĉesis aperadi. En Nederlando, kie aperas multe da E-gazetoj, ĝi ne povis trovi sufiĉe grandan abonaron - kaj eksterlanden oni ĉiam baraktas kun malfacilaĵoj rilate al pagado. Ĉu nekrologo? Kontraŭe - ni estas konvinkitaj, ke post certa tempo tiu ĉi simpatia kaj utila revuo reviviĝos. Do, ĝis la revido!

BOLETIN, organo de Hispana Esperantista Federaoio prave fieras pri 19a kongreso de Hispanaj Esperantistoj, kiu okazis en Castellon. 5-a numero de tiu bela revuo enhavas ampleksan raporton pri ĝi. - En numero 5 je la sama gazeto ni kun intereso legis LETERON DE IZRAELO de nia membrino Marie GINZOVÁ, kiun la redakcio represis el nia BULTENO.

AL LA PACO, cirkulero de MEM por Italujo en sia 5-a numero alportas artikolon

- 5 -

de s-ano Frantl el Opava pri lia januara sukcesa elsendo en televida stacio Ostrava, dum kiu efike estis propagandita internacia lingvo.

HEROLDO DE ESPERANTO informas en sia 4-a numero, ke dank' al fervora nederlanda s-ano Heni Thien la Registara Filatela Oficejo de SAN MARINO certe eldonos poŝtmarkojn honore al la centjara naskiĝdatreveno de L.L.Zamenhof. Rilate al la filatelista graveco de tiu ĉi landeto, sendube granda sukceso!

POLA ESPERANTISTO - luksa organo de AEP, bedaŭrinde same kiel kelkaj aliaj E-revuoj /inkluzive la nia/ prokrastiĝas. En la 4-a numero /julio-aŭgusto/ aperis du artikoloj de nia prezidanto Jaroslav MAŠÍK: detale raporto pri Esperantista Junularo en Ĉeĥoslovakio kaj referato pri la esperanta prezentado de "Legendo pri la amo". Ni atentigas nian membraron kaj rekomendas al ili legi ĉi tiujn interesajn artikolojn, kies represon ni ne povas fari.

ESPERANTO REVUO INTERNACIA n-ro 640 /marto/ honorigas nian karan membrinon Julie ŠUPICHOVÁ, kiu la 27-an de januaro ĝisvivis sian 75-an jaron. Ankaŭ ni prokraste gratulas kaj deziras al ŝi feliĉon kaj sanon.

En la sama n-ro troviĝas raporto de CED laŭ kiu dum la pasinta jaro okazis entute 1560 radioelsendoj en Esperanto. Per malgranda statistiko oni pruvas daŭran progreson de internacia lingvo en la radio. Elsendoj daŭris kune precize 459,35 horojn. Entute regule elsendis en Esperanto 17 radiostacioj en Aŭstrujo, Brazilo, Bulgarujo, Francujo, Gvatemalo, Hispanujo, Italujo, Jugoslavio, Nederlando, Svedujo, kaj Svislando. Estas rimarkinde, ke en la antaŭa numero de ESPERANTO trovigas artikoleto de S.S.de Jong "Ĉu la VERDA STACIO BRNO fenikse re-ekvivis?", priskribanta la klopodon de s-ano Sáva Střelec, Tábořská 126, Brno 15, kiu volas revivigi tiun faman stacion, bonege konatan en Esperantujo. Bonvolu do amase skribi kaj peti enkondukon de Esperanto programoj en la elsendplanon de la radio-stacio Brno. Ne ĉesante ni sukcesos.

TAGIĜO n-ro 42 - denove riĉa interesa enhavo. Vere nia junularo povas fieri je sia gazeto. Eroj de enhavo: raporto pri eldono de la unua manlibro dev ĉeĥa-ĉina konversacio en Peking, Kies aŭtoro estas D-ro Sawa Ch's'man /Sawa H-s-man/ konata inter ni kiel d-ro Sáva Heřman, membro nia. Plue pri novdataj tradukoj el la ĉeĥa literaturo, nome pri "Manon Lescaut" de Nezval /Kofínek/, "Fanjo" /Kofínek/, kiun oni eldonos en Jugoslavio, kaj "Argenta vento" de Fráňa Šrámek /prof. Jaroslav Mráz/, Tre interesa artikoleto pritraktas grandan evoluon en Pollando antaŭ la UK. Ankaŭ unu pola marŝipo, konstruota en 1959, propagandos nian lingvon per sia nomo kaj la tuta ŝipanaro parolos ĝin.

ATENTIGOJ:

ĈIUJ MEMBROJ DE LA TEĴA /Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio/ estas urĝeĝe petataj egaligi kiel eble plej baldaŭ la ŝuldatajn abonkotizojn par la gazeto "Internacia Ĵurnalisto" almenaŭ per elsendo de E-libroj, kompletaj gazetaj jarkolektoj, glumarkoj, kts, en proksimuma valoro de 15,- Kĉs po jare. Sendu registrite al Ivan Keremedziev-Esperov, redaktoro de "Internacia Ĵurnalisto", blv. Hristo Botev n-ro 98, SOFIA 2, Bulgario - Kun anticipa danko: Joĵko Staněk, Ĵurnalisto, landa reprezentanto de TEĴA por ĈSR, Osadní 45., PRAHA-Holešovice.

TUTMONDA GAZETARA EKSPozICIO en OVIEDO - Hispanujo, aranĝata de tiea Esperantista Klubo "Nordo" sub patronado de Sindikataj Aŭtoritatoj Hispanaj okazos dum ĉi-jara septembro. Oviedaj esperantistoj sin turnas al esperantistaro de tuta mondo kun peto, ke ili sendu al la aranĝantoj po unu ekzemplero de ĉiuj nacilingvaj ĵurnaloj, gazetoj, revuoj ilustritaj, porvirinaj, porinfanaj, fakaj kaj aliaj. Ni kredas, ke ĉeĥoslovakaj preson en tiu ekspozicio oni povos prezenti helpe de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. La materialon bonvolu sendi al: ESPERANTISTA KLUBO "NORDO", S. Juan OVIEDO, Hispanujo.

SERĈATA estas Revuo ESPERANTO n-ro 624 /11/ el jaro 1957- Ni tre petas niajn amikojn donaci kaj eble per registrita poŝto sendi al ni kelkajn ekzemplerojn» kontraŭ modesta rekompenco. - EKP EKSPozICIO DE INFANDESEGNAĴOJ pasintjare famiĝinta en Znojmo estos ĉi jare aranĝata en ORLOVÁ, uzina klubo de minejo A.Zápotocký ekde 1.6. ĝis 22.6. Adreso de posedantoj Miloš HRUŠKA, Osvětová Beseda Znojmo.

- 6 -

Hilda Bresen /Tallinn/:

Anemonoj

Anemonoj, blankaj, fruprintempaj floroj,
kiam vidas mi vin, belaj rememoroj
pri la infanec' el malproksimo
kun flugila paŝo svebas al animo.

Kiam vian bonodoron mi enspiras,
kiu nur al freŝa humodor' similas,
ŝajnas, kvazaŭ io forgesita, kara,
ree por mi igas komprenebla, klara.

Tial, anemonoj blankaj, mi vin ŝatas,
kiam mi kolektas vin, la kor ekbatas
june, kaj la mond' eksajnas ore blua,
kiel iam dum la infaneco frua.

POSTKARTO AL MAKSIM GORKIJ.

Traserĉinte la arĥivon de Maksim Gorkij en Moskvo, unu juna sciencisto nia, nome dr. Mojmír BOTURA, kiu mem ne estas esperantisto, trovis inter vasta korespondaro de la fama verkisto strangan postkarton, kiun la soveta arĥivisto traktis foje kiel itale foje kiel verŝajne-hispane skribitan. Jen la teksto: "Estimata k-do M.Gorkij!

Kun granda ĝojo mi legis Vian libreton "Kiel mi lernis" kaj aliajn.

Mi tre ĝojus, se mi ricevus de Vi unu karton kun Via subskribo, aŭ alia malgranda memoraĵo, ĉar mi tre ŝatas Vin kiel plej grandan rusan modernan verkiston. Kun saluto - Franz KRANER.

2.6. 1936, F.K. Rosenthal 29 u Mostu, Ĉeĥoslovakio."

Nia amiko tuj ekkonis Esperanton kaj forigis eraron pri lingvo de la postaĵo. Do, el Ĉeĥoslovakio unu simpla laboristo salutis grandan verkiston alilingvan, uzinte plej modernan komprenilon - internacian lingvon. Belega dokumento!

jmh

/daŭrigo de la 1-a paĝo:/

rememoras la januaran artikoleon de prof. Daneš en Literární noviny, en kiu la nomita asertas, ke Esperanto estas lingvo nevivanta, per kiu neniam iu ajn amis. Certe li ne scias pri sennombraj esperantistoj-geedzoj, kiuj enamigis pere de tiu "artefarita" lingvo, kiuj tute neartefarite, nature faris sian amdeklaron ĝuste en Esperanto, ofte ja nekonante alian komunan lingvon./ La ideo de nia lingvo, la Zamenhofa ideo de tutmonda frateco kaj interkompreniĝo da diversaj popoloj de l'mondo,

gajnis por la movado plimulton da taŭgaj, oferemaj laborantoj. La uzado allogis kelkajn, kiuj volis profiti - tio ja okazas, kiam oni sukcesas. Sed tiaj homoj ĉiam malbone ekzamenas dum malfavoraj jaroj kaj oni bone distingas ilin de la aliaj, oferantaj sen profiteco. Pravas tion nia ĉiutaga sperto. Ĉu ne korespondas la ideo de oferemo kun la socialisma moralo, laŭ kiu la laboro de unuopulo estu dediĉata grandparte al komuna prospero, eĉ estonta? Ĉu ankaŭ dum la vojo al socialismo ne okazas, ke aperadas homoj, serĉantaj privatan profiton aŭ gloron, malhelpantaj la penadon de aliaj, sindonaj, honestaj laborantoj? Jes, tio estas ordinara signo de ĉiu progreso - la sukceso iom koruptas. Tamen, kiu iras antaŭen, kiu traboras la vojon, kiu portas la torĉon en mallumon, kiu baraktas kun malfavoro, malespero kaj miskompreno, tiu ne povas pensi pri profito.

Zamenhof estis bhomo de tia speco, Li devis trabori, li portis torĉon. Rigardante al li dunlia jaro ni klopodu similiĝi iom al lia modesta; nebTa koro kaj senlaca laboremo.pere de kiu oni pravas sian amon. Tiamaniere ni alportos econ tiom bezonatan en la hodiaŭa mondo.

jmh

- 8 -

KORESPONDI DEZIRAS ...

ĈEĤOSLOVAKIO:

S-ano Vládo FIALA, Řepov 117, MLADÁ BOLESLAV; 17-jara interŝanĝos PI kun Ĉiuj landoj kaj korespondos.

S-ano Jakub V.VALNIČEK, Husovická 8, BRNO II; 18-jara deziras korespondi kaj interŝanĝi PK kun tutmondo.

F-ino Jana KAbEŠOVÁ, Fricova 388, MĚLNÍK; ,16-Jara studentino korespondos kun ĉiuj landoj pri sporto, intŝ BK.

3-ano VANDLÍČEK, Bezručova 24, Aá; korespondos kaj interŝanĝos gazetojn.

3-ano Teodor ANDREAS, KrupskeJ 55; KOŠICE; BK, ilustr.gazetojn, ktp.

S-ano Jaroslav BEČKA, ŘÍČANY II./ /219 ĉe PRAHA koresp.,PK k.ĉ.l.sporto

S-ino Marie ČADOVÁ, Stalinova 351, VIMPERK; BK, filmoj, modo, libroj, ktp.

S-ano Ladislav KRÁLOVEC, postkesto 56, PLZEŇ 1; L,BK tutmonde interes.t.

3-ano Květoslav KREJČÍ instruisto, Žerotínova 34-0, HOŘICE; BK,L,kcl.

S-ano M.FEJFAR, DYMOKURY 268 u Poděbrad; L,BK ,PM,foto, tutmonde.

S-ano O.POTJR, DYMOKURY 87 u Poděbrad; BK,L,PM,foto, tutmonde.

3-ano Oldřich KOSINA, DYMOKURY 7 u Poděbrad; L,BK.fotoj,ktp.tutmonde.

S-ano Zd.TOMEK, 26-Jara oficisto, DUČKÍKY 5o,okr.Roudnice,,n.Lab.; L,BK, PM kun gesamideanoj en ĉiuj landoj.

S-ano Josef PÁCALT, HAJHICE 54 apud Dvůr Králové n.L.; L.BK.tutmonda

S-ano Ludvík ŽIDLÍK, konstruisto, Spáčilova 63, BRKO 18; L,BK,kcl.

3-ano Jaroslav ZELENKA, Fučíkova 9 VIMPERK, PK,L,PM,kcl.pri diverstemoj.

10 GEKURSANOJ KOMENCANTOJ serĉas amikojn en la tuta mondo: Jos.CHVOSTA Gottwaldova 221, PODĚBRADY, L,3K,PM.

SOVETUNIO:

E-klubo - C .A.GEJER, str. Orgonikičť ze 11, teatro, NOVOSIBIRSK;pri arto.

S-ano Uno NEPP, 7 aani 3, TORVA, Estona SSR, 37-Jara ing., PM,BK.

F-ino Eha NEPP, 7 aani 3, TORVA Estona SSR; 17-jara studentino, PM,BK, alumetetiketojn interiingos.

S-ano Valdemar KIINSJA, Leebiku s-Jsk, TORVA, Estona S3R; studento de filologio, L.BK.kun ges-anoj en c.l,

S-ano Viktor cyiiAKOV, Saltykov-Sce- drin str.32/34,log. 13, LENINGRAD D 194

L,BE,PM,fotoj,sporto,ktp.kel.

S-ano A.KUBULNIEKS, p.n.Vecogre, Ogres 7—g.skola ERGLU raJ.,Latvia SSR BK kun ges-anoj el Azio k.Afriko.

S-ano Nikolo LEVASOV, Ostrovnaja 4, 1.6, VIBORG de Leningrada regiono; 2o- Jara fraŭlo,radisto,L,BK, kun CenoJ.

S-ano Vladimír GORAZEEV, OpitniJ učas- tok,Abonem. Jaŝĉik n-o 25, MAGADAN, Nordorienta Siberio, L,BK, tutmonde.

S-ano Izraelo G.KUDRJAVICKĴJ, ulica ĉefiova 25, kv.I, MOSKVO K-6; satus ri- cevi E-eldonaĵoJn, libroJn,diskoJn,kfcp Kontraŭpago per sovetaJ seriaj PM uz. k.neuz.kaj per ĉiuj livereblaj aĵoj.

S-ano Aleksandro KUBRJVICKIJ, ul. ĉeĥova 25 kv.I, MOSKVO K-6; 15-Jara knabo kun samaguloj L,BK,PM,tutmonde.

S-ano Aleksandro DUBROVIN, vil.Lenina lo, GALIĈ, Kogtromska obl.; 17-Jara kun Junularo el ĉiuj landoj L,BK.

S-ano Benjaminas KUDIRKA, Ragycio 39-2, KAUKAS 8, Litova SSR; BK,kl.

S-ano Edvardas SAVICKAS, Ragucio 39-2, KAUNAS 8, Litova SSR; FM.kol.

S-ano Boris BARMUJ, Karja 1-6. RAKVERE, Estona SSR; FK,PM kun ĉeĥosl.

S-ano Boris VOIKER, Esperanto, centra poŝto, TIROSPOL, Moldavio; kun ĉiuj landoj en Esperanta, angla, franca, germana, rusa, rumana k.bulgara, Inter- nacia klubo de gestudentoj.

POLLANDO: A

S-ano Ing.Michael LODZIANA, str. PKWN, No 27/7, BXELSKO-BIALA; korespondos kun Ĉeĥoslovakoj.

BULGARIO;

S-ano Dimitr VASILEF, koop.Kolektiĵ SZOPiÓL; donos ĉiujn informojn pri la Nigra Maro.

F-ino Gergana DIMOTROVA, str.Paun Grozdanov 93» SOJIQ; 20-jara medicina kursistino, kun ĉeĥa e-isto.

S-ano Mladěn-DANEV, MÍHALOI PAVLI- KENSKO; BK kĉl.

S-ino Elena KOVAGEVA, str .T.Burmov 13, GABROVO; 45-jara instruistino korespondos kun cehoj.

S-ano Marin PA LEY, ul. Zelenka No 35 TIRNOVO; gimnaziano, kun ĉehoslov.Hl.

HUNGARIO:

F-ino Eva PATAKI, Garam 23, MISKOLC lo-Jara komercantino, BK,ktp.kel. RUMANUJO:

S-ano VOICULESCTJ STELICÁ, Calea Grivitei No 13, Raionul Stalin, BUCURESTI; 22-Jara studento de fervoja teknika instituto serĉas leteramikojn ĈSR.

S-ano Anastasiu GHEORGHE, B due Ghica-Tei No 53, E. 1 Mai, BUCURESTI; korespondos kun gesamideanoj tutmonde.

S-ano Inĝ.Mihai STEFAN, str.Doroban- ti 356, BRAILA; 24-jara gvidanto de E-klubo, deziras esti gasto reciproke.

S-ano Petrisor VIRGIL, Sólisté de Vascau 47, Reg. ORADEA; BK,revuoj pri modo, 3porto kaj esp.-aĵoj kel.

S-ano Mirĉea DRAGOTESCU, str.Dr.V. Sión 5, raion Gh.Gh.Dej, BUCURESTI; korespondos pri aktualaĵoj kĉl.

LINGVA ANGULETO

ĈU — SE

Otázka: Která z těchto vět je správná?

1. Mi telefonos al vi, se mi ankaŭ ekskursos.

2. Mi telefonos al vi, ĉu mi ankaŭ ekskursos.

Odpověď: Obě jsou správné, ale každá má jiný smysl:

1. Budu vám telefonovat, jestliže půjdu na výlet. /Nepůjdu-li, nebudu vůbec telefonovat/

2. Budu vám telefonovat, zda také půjdu /či nepůjdu/, t.j. budu vám telefonovat v každém případě.

Ĉeŝtí esperantistoj nekdy zaměňují obě spojky, kladouce SE /=jestliže/ tam, kde má být ĈU /=zda/. Je to asi důsledek toho, že v hovorové řeči se užívá pro oba případy JESTLI: Zatelefonuj, jestli /=zda/ přijdeš. Jestli /=jestliže/ budu hotov, přijdu k tobě.

Rozlišujme tedy:

Nepůjdu na výlet, jestli /=jestliže/ bude pršet.- Mi ne ekskursos, se pluvos. Jestli /=jestliže/ si myslíte, že to stačí, mýlíte se. - Se vi opinias, ke tio sufiĉas, vi eraras. Jestli /=zda/ mají pravdu, posuňte sám.- Ĉu ili pravas, juĝu vi mem. Nevím, jestli /=zda/ budu vĉas hotov.- Mi ne sclas, ĉu mi estos preta ĝustatempe. Rád bych věděl, jestli /=zda/ on tam také bude - Mi ŝatus scii, ĉu ankaŭ li tie estos.

Hmd

LINGVOSCIOJ

Ne estas nur unuspeca sciado de lingvoj. Estas kelneroj, kiuj parolas tri kvar lingvojn kaj legas, skribas nur la sian; dum filozofoj, psikologoj, fizikistoj, verkistoj legas, vide komprenas kvar, kvin lingvojn kaj parolas nur unu. Tamen, ĉiulande en lernejoj, ĉu privataj ĉu oficialaj, oni generale pensas ke lernigado aŭ lernado de lingvoj rilatas ĉiam identan, ĝeneralan scion: kompreni kaj paroli, legi kaj skribi. La universala fakto ke la rezultato estas 90% malsukceso de tia agado, preskaŭ neniel influis

tian instruistaran kaj lernantaran pretendon. La fakto ke multe pli facile oni lernas lege, vide kompreni tri fremdajn lingvojn ol samamplekse skribi, verki en unu, ŝajnas tute ne rimarkinda, kvankam tiel rimarkebla!

KULTURLINGVOJ

Se antaŭ longtempe estis en Eŭropo nur du-tri kulturlingvoj: greka, latina, araba, poste stariĝis multaj, ĉiuj modernaj itataj; kaj nuntempe, ne nur la ŝtataj, sed ankaŭ preskaŭ ĉiuj naciaj, estas kulturlingvoj. Kemoru, kiom da lingvoj estis nerekonataj antaŭ la falo de la rusa caro kaj de la aŭstria imperiestro. Feliĉe en Eŭropo restas preskaŭ nur la kataluna lingvo nuntempe forpelita el ĉiuj lernejoj en sia popolo. Eĉ la romanca lingvo parolata de popolo kiu estas centono de la katalunlingva, fariĝis rekonata kulturlingvo en ĝiaj lernejoj. Tio signifas ke antaŭ 20 jarcentoj dulingvulo estis poligloto kaj nun meza poligloto devus esti tri-kvarlingva.

/El la saĝa libreto de Delfi DALMAU: "Dialekto, dialektiko".Barcelona/

BULTENO - informilo de ESPERANTISTA KLUBO en PRAHA, rondeto de Osvětová Beseda en Praha 2. Kluba korespondadreso: EK en Praha, Dlouhá 10, Praha I. N-ron 53-an ilustris Dolfa Bartošík..

A-09305